

JURA
TRIBUNO
INTERNACIA



N-ro 13
Jaro 2014
Esperanta Jura Asocio

Eldonas: ESPERANTA JURA ASOCIO
kun la kunlaboro de Andaluzia Esperanto-Unuiĝo

Poŝta Adreso: José María Rodríguez Hernández
JURA TRIBUNO INTERNACIA
Apartado de Correos 3142
E-14080 CÓRDOBA (Hispanio)

Elektronika Adreso: esperanto14@ono.com

Direktoro: José María Rodríguez Hernández

Kunlaboris ĉi-numere: D-ino Rafaela Urueña Álvarez
Prof. Luis Córdoba Arellano


La revuon ricevas ĉiuj membroj de EJA. Por aliĝi al nia asocio informoj aperas sur la paĝo 8-a

Depósito Legal: CO-844/97
Edita: Asociación Andaluza de Esperanto
Apartado de Correos 611
14080 Córdoba
Imprime: Litopress SL

ENHAVO

	Paĝo
Prezento	5
Vivo de la Asocio kaj Esperantaj Juraj Informoj	10
Raporto pri la agadoj de EJA dum la Universala Kongreso. Rejkjaviko	14
Problemoj en la markoko de Ĝibraltaro La enhavo de la Traktato de Utrecht	21
La Azil-raĵto kaj la internacia protektado de la religia libereco	39

PREZENTO



Asocio ekzistas por plenumi agadojn kiujn, izolite, homoj ne kapablas sukcesigi, tio ankaŭ aplikeblas al nia asocio. Kvankam sufiĉe modestaj, la agadplanoj de Esperanta Jura Asocio EJA, sen-ĉese realiĝas kaj jen la pruvo, kiam ni, unu jaron plian, renkontiĝas kadre de la Universala Kongreso de Esperanto kaj ni diskonigas niajn agadojn kaj prezentas niajn publikaĵojn

Ĉi jare la kongreso okazas en Argentino, en la sudo de la mondo. La ideo pri “sudo” estas io pli ol nura geografia vorto, ĝi aludas tion kio estas ekstere de la centro. Verdire la centro de la movado estas la centr-eŭropaj landoj, plus Rusio, Ĉinio, Japanio kaj Usono. Sed kiel asertis la urugvaja verkisto Mario Benedetti, *ankaŭ la sudo ekzistas*, kaj ĉi-jare ankaŭ rilate nian movadon. Nia asocio, EJA, sufiĉe scias pri tiu sudo, ĉar la revuon, la librojn eldonitajn kaj la oftajn kursojn en la juraj fakultatoj okazas en Hispanio kaj Meksikio, do, ekstere de la centr-eŭropa movado. Do, ni ĝojas pro la organizado de la ĉi-jara UK en Bonaero.

Kiel dirite, asocio sukcesas se oni kapablas plenumi agadojn, multajn aŭ malmultajn, sukcesajn aŭ modestajn, sed agadojn plenumitajn kun la celo disvastigi nian internacian lingvon en la jura medio. Ĉi-jare ni tut-fiere prezentas novan libron, temas pri la dua verkaĵo eldonita de nia asocio, post tiu jam fora *Kodo de Hamurabo*, eldonita en la jaro 1999. Hodiaŭ aperas *Eŭropa Unio, paŝon post paŝo*, kie nia Prezidantino, D-ino

Rafaela Urueña, pritraktas historie kaj nuntempe la Eŭropan Union, tiu internacia organizo kiu en la jaro 2012 atingis la Nobel-Premion pri Paco kaj kiu alvenigis en Eŭropon la ekonomian prosperon kaj ĉefe la pacon post multnombraj militoj, kelkaj speciale kruelaj, kiel la unua mond-milito, kies unuan jarcenton oni memoras en 2014.

Alia pruvo de la laboro plenumita de nia asocio estas la eldono de nova numero de nia revuo, kiun ĵus nun Vi havas enmane. Temas pri la 13-a numero de nia oficiala organo, ĉi-numere la enhavo ne estas tiel ampleksa kiel tiuj de pasintaj jaroj, pro tio ni profitas ĉi tiujn liniojn por peti Vian kunlaboron por venontaj numeroj. Tutcerte Vi interesiĝas pri kelka konkreta branĉo de la jura scienco aŭ pro Via laboro sendube Vi devas konsulti kaj prepari eseojn pri specifaj juraj temoj, ĉu Vi ne pripensis iam la eblecon aperigi Viajn eseojn en nia revuo? Ne hezitu fari tion por la venonta numero.

Sed malgraŭ ĉio, ni sukcesis aperigi novan numeron de *Jura Tribuno Internacia*. Ene de ĝi Vi trovos du eseojn, la unua fare de nia Prezidantino, D-ino Urueña, kiu verkis altvaloran artikolon pri la marjuraj problemoj inter Hispanio kaj Britio ĉirkaŭ la brita kolonio Ĝibraltaro, sude de la Ibera Duoninsulo. Ambaŭ ŝtatoj subtenas malsimilajn poziciojn, kaj sendube ambaŭ partioj trovas siajn opiniojn akordaj al internacia juro. D-ino Urueña realigas historian skizon pri la problemo, studas la kialojn de ambaŭ partioj kaj fine ŝi elstaras la necesan kunlaboradon de ambaŭ ŝtatoj se oni deziras konservi la naturan medion en tiu zono.

La alian artikolon kiun Vi povos trovi ĉi-numere verkis la Direktoro de la revuo. Temas pri la azil-raĵto bazita sur la religiaj kredoj de la azil-petanto. Nuntempe la elmigrado estas tutmonda

fenomeno, ofte tiuj migradoj baziĝas nur sur ekonomiaj aferoj, la deziroj plibonigi la vivajn kondiĉojn de la homoj, sed foje tiuj kialoj baziĝas ĉefe sur politikaj aŭ religiaj kaŭzoj. Se la ekonomiaj motivoj por elmigri estas pritraktataj de neniu internacia kunveno, la aliaj kaŭzoj, kaj inter ili la azil-petoj bazitaj sur religiaj kialoj, aperas ofte sur internaciaj traktatoj celantaj eviti la persekutadon de homoj en iliaj propraj ŝtatoj kaj certigi la homajn jurojn de tiuj homoj.

Do, ni invitas al Vi legi la 13-an numeron de nia revuo kaj ni profitas ĉi-okazon por peti denove Vian kunlaboron por ebligi novajn numerojn de la revuo. Kiel asertite komence de ĉi tiu prezento, asocio ekzistas se estas eble realigi novajn projektojn, espereble la ĝenerala kunveno de Esperanta Jura Asocio, okazonta kadre de la Universala Kongreso de Esperanto en Bonaero, estos kapabla pripensi, redakti, proponi kaj meti la necesajn unuajn bazojn por aliaj novaj projektoj.

José María Rodríguez Hernández
Direktoro de JURA TRIBUNO



Haveno de Bonaero en la 19-a jarcento

ALIĜU AL ESPERANTA JURA ASOCIO

Ordinara membro devas esti profesia juristo aŭ posedi universitatan aŭ ekvivalentan diplomon pri juro aŭ esti studanto por tia diplomo. Ĉiu alia persono povas peti aliĝon kiel asocia membro. Membriĝo kostas 7 eŭrojn se vi loĝas en iama socialisma lando de Orienta Eŭropo, Azio (escepte de Israelo, Japanio kaj Korea Respubliko), Afriko aŭ Latina Ameriko. Kaj 14 eŭrojn se vi loĝas en alia lando.

Eblas pagi al UEA-konto ejax-r (pri pagmanieroj vidu en la *Jarlibro* de UEA). Se kotizi kaŭzus al vi transpagajn aŭ ekonomiajn malfacilojn, bv. skribi pri tio al la sekretario luisesperanto@yahoo.com aŭ al la elektronika adreso: esperanto14@ono.com



Kunlaboru kun JURA TRIBUNO INTERNACIA

Se Vi emas verki en esperanto pri juraj temoj ni plezure aperigos Viajn kontribuaĵojn en niaj paĝoj. Vi nur devas atenti pri la jenaj kondiĉoj:

ARTIKOLOJ: rilataj al iu jura branĉo. Do: krimpuna, ekonomia, imposta, civila, internacia, historia, filosofía, administracia, ktp. Pri la

longeco, pli malpli 4/10 foliojn A4 (unuflanka duobl-spaca). Se eble aldonu kelklinian resumon pri la artikolo.

RECENZOJ: Vi povas recenzi verkon. La libro elektota devas temi pri Juro, kvankam ne necese pri/en esperanto. La libro povas esti redaktata en kiu ajn lingvo, tamen la recenzon oni devas verki en esperanto.

INFORMOJ: Vi povas informi pere de ĉi tiuj paĝoj pri juĝoj, novaj leĝoj, internaciaj aferoj, traktatoj, ktp, aŭ pri io rilata al la Juro en Via lando aŭ komunumo. La informoj devas ampleksi 1/3 foliojn.

TRAKTATOJ: se Vi tradukis kelkan internacian traktaton, aŭ scias kie aperas la Esperanto-traduko de kelka internacia kunveno, informu al ni pri tio.

Ne dubu kunlabori kun la jura revuo. La proksima numero aperos dum la monato junio 2015, do, prefere se oni ricevas la materialon antaŭ la fino de la monato majo 2015.

La redakciaj adresoj estas:

✉ *Jura Tribuno Internacia*. Apartado de Correos 3142 E-14080 Córdoba (Hispanio)

📧 esperanto14@ono.com

VIVO DE LA ASOCIO KAJ ESPERANTAJ JURAJ INFORMOJ

★ Libro ĵus eldonita

Kiel anoncote sur la pasinta numero de nia revuo, unu el la agadoj pripensitaj por la jaro 2014 estis la eldono de nova libro pri juraj aferoj fare de Esperanta Jura Asocio. Do, estas por ni granda plezuro sciigi pri la apero de *Eŭropa Unio, paŝon post paŝo*, kies aŭtorino estas la D-ino Rafaela URUEÑA, prezidantino de nia asocio. La libro estas kuneldonita de EJA mem kaj de Andaluzia Esperanto-Unuiĝo kaj oni prezentis la novan verkon kadre de la ĉi-jara Hispana kaj Andaluzia Kongreso de Esperanto, okazinta en la urbo Arundo, sude de Hispanio.

La antaŭparolon verkis D-ro Seán Ó Riain, prestiĝa Irlanda esperantisto kaj diplomatiisto. Tra siaj 150 paĝoj la libro pritraktas la evoluon de la Eŭropa Unio ekde la fondiĝo de la Eŭropa Komunumo pri Karbo kaj Ŝtalo en la jaro 1952 ĝis la ĵusa aliĝo de Kroatio en la jaro 2013 kiel lasta membro de Eŭropa Unio. La libro analizas ne nur la eŭropajn komunumojn sed ankaŭ aliajn instancojn kaj organojn kiel la Parlamenton kaj la Eŭropan Tribunalon.

La libron prezentis la aŭtorino mem kadre de la kongresoj de Esperanto de Andaluzio kaj Hispanio dum la pasinta monato majo. Antaŭprezentis la aŭtorinon, S-ro José María Rodríguez, kiu dankis la D-inon Uruena pro ŝia granda laboro redakti libron pri tre aktuala temo: la Eŭropa Unio, li eĉ konfesis, ke li mem uzis la manuskripton de la libro por prepari ekzamenon pri

eŭropunia juro, ĉar li ne sukcesis trovi pli skeman, sed samtempe kompletan, libro pri ĉi tiu temo. Laŭ José María Rodríguez, videblas, ke la aŭtorino de la verko estis multjara universitata profesorino.



D-ino Rafaela URUEÑA prezentas sian libron *Eŭropa Unio, paŝon post paŝo* en Arundo (Hispanio) kadre de la Hispana kaj Andaluzia Kongresoj de Esperanto. Majo 2014.

Okaze de sia prelego la D-ino Urueña dankis tiujn kiuj ebligis la aperon de la libro kaj resumis ties enhavon. Ŝi, per duonhora parolado, analizis la kialojn pri la verkado de la libro kaj la enhavon de ĉiuj ĉapitroj, kiuj, el jura vidpunkto, analizas la historion de la Eŭropa Unio, de ĝia komenco ĝis la nuna momento.

Kompleta prelego videblas ĉe la Hispana Esperanto-Federacio
jutuba kanalo ĉe

<https://www.youtube.com/watch?v=1ax86yKpTo8>

★ Nova TTT-paĝo de ESPERANTA JURA ASOCIO

Dum la lastaj jaroj ne tro bone funkciis la retan paĝon de nia asocio, kio ja ne oferis taŭgan rigardo de EJA. Do, komence de la monato junio ni decidis ŝanĝi la eksteran aspekton de la TTT-paĝo kaj eĉ situi sin ĉe alia servilo. La enhavo ne multe ŝanĝos, kvankam ni invitas ĉiujn membrojn kaj simpatiantojn de nia asocio, havigi al ni viajn opiniojn, pensojn kaj ideojn pri kio ni povus oferi pere de iterreto.

La elaborado de ĉi nova TTT-paĝo ni ankoraŭ ne finis, tamen ni jam invitas viziti ĝin ĉe:


<http://www.esperantajuraasocio.jimdo.com>



★ **Serĉata advokato, specialisto pri filmindustriaj kontraktoj**

La redaktoro de *Esperanto-TV*, la plej granda kaj ampleksa Esperanto-televida stacio, sciigas al ni, ke li volas kontakti esperantajn advokatojn por helpi lin krei taŭgajn kontraktojn por la Esperanta Filmindustrio. Ĉe tiu televid-stacio ĉiutage oni elsendas filmojn por la spektantoj kaj de la spektantoj, do ili havas multajn problemojn rilate la kopirajtoj, do li volas krei kelkajn taŭgajn kontraktojn por protekti sian organizon.


Interesitoj kontaktu: r_delamore@hotmail.com



Preĝejo Sankta Ignaco en Bonaero.
Starigita inter 1686 kaj 1722

Raporto pri la agadoj de Esperanta Jura Asocio dum la Universala Kongreso Rejkjaviko 2013

Universala Kongreso en Rejkjaviko estis bonega okazo por la tieaj partoprenantoj, koni novan kulturon kaj diverspecajn spertoj en tiu nordia lando.



La Prezidantion de EJA ĉe la giĉeto de la Asocio kun ekzemplero de nia pasintjara revuo.

Ĉijare, unu plian fojon, mi partoprenis la *Movadan Foiiron*, okazinta sabate la 20-an de julio, de la 19-a ĝis la 21-a horo, ĉe norda halo de la impona kaj modernstila *Harpa*, sidejo de la islanda simfonia orkestro kaj opero, kaj nunjara kongresejo, per tablo pretigita por nia Asocio, kiun ni kundividis kun Hispana Esperanto-Federacio.

Tie mi prezentis ekzemplerojn de nia revuo *Jura Tribuno Internacia* kaj aliĝilojn por novaj membroj, ornamita la tablon per belaj afiŝoj de Kordovo, la urbo kie oni eldonas la revuon, kaj Valadolido, la urbo kie loĝas la Prezidantino de la Asocio.

Tiu evento estis plenplena de kongresanoj kiuj trakuris la diversajn standojn, dum ili ricevis informojn pri ĉiu asocio, tiel kiel okazis ĉe la nia, kie multaj alproksimiĝis por scii pri kio

temas kaj, se ili estas juristoj aŭ studentoj pri juro, ricevi la revuon.

Ĵaŭde la 25-an, de la 11:45 ĝis la 12:30 horo, ĉe salono *Beleva*, certe tro granda por ni, okazis nia jarkunsido, kun ĉeesto de 25 gesamideanoj, inter membroj kaj simpatiantoj. Sub la prezido de la Prezidantino, Prof. María Rafael URUEÑA, ni komencis per informoj pri niaj agadoj. Unue mi prezentis la laboron de nia Sekretario, Prof. Lic. Luis CÓRDOVA, el Meksikio, kiu denove ĉijare aranĝis kurson pri Esperanto de la



Azia kongresanino interesiĝas pri la Asocio.

23-a de februaro ĝis la 1-a de junio 2013, ĉe la Aŭtonoma Nacia Universitato de Meksiko (UNAM), por gelernantoj de diversaj fakoj, inter ili juro kaj internaciaj rilatoj.

Laŭ informoj de Prof. Córdoba, kiel pasintjare, antaŭ la kurso okazis Konferenco pri la Internacia Lingvo Esperanto ĉe la Fakultato pri Juro de UNAM, kaj dum la lasta lekciono, S-ro Martin SCHÄFFER parolis al la gelernantoj pri kiamaniere daŭrigi la lernadon kaj praktikon de Esperanto kaj pri sia praktikadon per kunsidoj ĉe restoracio proksima al la Universitato. Oni antaŭvidas alian kurson post somero ĉe UNAM. Certes, gratulinda laboro de nia Sekretario.



La Prezidantino de EJA okaze de parolado dum la kunsido de la Asocio.

Mi mem, la 14-an de majo, vojaĝis al hispana urbo Salamanko, por prelegi pri Esperanto kaj fakaj agadoj, ĉe la Fakultato pri Lingvistiko, pere de interesa ekspozicio kaj prelegoj aranĝitaj de CGT (Laborista Asocio).

Poste, mi parolis pri nia financa situacio kaj la klopodoj de nia redaktoro atingi novajn membrojn, dum oni instigis la ĉeestantoj pagi la kotizon dum la Kongreso.

La Prezidantino prezentis la agadplanon por venonta jaro 2013/2014.

Unue, oni antaŭvidas la eldonadon de la libro “*Eŭropa Unio, paŝon post paŝo*”, de Prof. Rafaela Urueña, kiu momente havas manuskripton kaj espereble, post korektado, estos preta por publikigo.

Ankaŭ, laŭ sugesto de S-ro José María Rodríguez, ni eble partoprenos en la projekto “Esperanto en la Universitato”, kiu temas pri la realigo, pere de interreto, de universitatnivelaĵoj kursoj pri diversaj temoj. Jam estas dissendataj kursoj de S-ro Glossop kaj Amri Wandel, kaj nia redaktoro sugestas kurson pri Mara Juro.

Pri la revuo, mi reliefigis la fakton, ke nia revuo naskiĝis antaŭ 15 jaroj, por anstataŭi la konatan *Internacia Jura Revuo*, kaj ke ni atingis nian 12-an numeron. Fakte, la redaktoro denove pretigis la nunjaran revuo kaj danke al sia sindediĉo kaj al Andaluzia Esperanto-Unuiĝo, li eldonis unu plian jaron nian revuon kun tre interesa enhavo. Ni devas esprimi nian dankemon al la direktoro, ĉar alimaniere ni malfacile havus nian revuon.

Mi instigis la partoprenantojn legi ĝin atenteme kaj verki artikolojn aŭ recenzojn por venonta numero. Ĉefe bonvenaj estas juraj novaĵoj el diversaj landoj.

Daŭrigante la kutimon pri prelego dum niaj jarkunsidoj, kaj post la interesa pasintjara prelego “*Advokatado en Angolo*” de nia S-ano Miguel Faria de Bastos, por daŭrigi tiun bonan praktikon, mi mem kuraĝis paroli pri aktuala kaj samtempe historia temo.

Do, la Prezidantino prelegis pri “*Problemoj kaj kvereloj en la Golfeto de Algeciras: la Traktato de Utrecht kaj siaj konsekvencoj en Ĝibraltaro*”, kiu traktis, post klarigo de la historiaj okazintaĵoj, pri la nunaj kvereloj inter la hispanaj kaj ĝibraltaraj fiŝkaptistoj, kaj la juraj argumentoj de la hispana kaj brit-ĝibraltara registaroj, kiuj malsimile interpretas la Traktaton de Utrecht.

Ŝi klarigis la diversajn poziciojn de Britio kaj Hispanio pri la mara jurisdikcio, pri la akvoj ĉirkaŭantaj la Rokon kaj la golfeton de Algeciras. Fine, ŝi parolis pri kurioza temo rilata al marprotektado kontraŭ la poluado de tiuj marakvoj, per kiu eniris en tiu malkonsento ankaŭ Eŭropa Unio, per du malsimilaj Decidoj por protektado de tiu areo kontraŭ la marpoluado, kiu kaŭzis ke Britio plendis ĉe la Kortumo de Eŭropa Unio, sub la konsidero, ke la lasta Decido inkluzivis akvojn ne-hispanajn.

Okaze de la lasta punkto de la kunveno, mi petis de la ĉeestantaro sugestojn kaj rekomendojn por estonta agado.



Komencis S-ro Faria de Bastos, klarigante kelkajn detalojn de sia artikolo publikigita sur *Jura Tribuno Internacia* n-ro 12 kaj la veran signifon de kelkaj juraj vortoj, kiel *milica*, *popola adjunkto de tribunalo*, ktp. por plej facila legado de la teksto.

S-ro Dennis KEEFE parolis pri la Universitato de Esperanto, kun la propono, ke estus pli taŭga baza kurso pri Juro, ĉar li opinias, ke estas malfacile enmeti juran temon. S-ro Fortuna pledis pri jura vortaro en Esperanto kaj S-ano ROTSAERT, memorigis, ke li opinias ke jam ekzistas tiu verko.

Fine, S-ro OSIBOV, el Kroatio, sciigis ke oni devas daŭrigi la kutimon prelegi dum niaj jarkunsidoj, do li mem oferis


sin por paroli pri la ege aktuala malkonsento pri marlimoj inter Kroatio kaj Slovenio, temo kiun nun kuŝas sub arbitracio.

La Prezidantino ege dankis lian proponon kaj fermis la kunsidon, sciigante sian dankemon al ĉiuj ĉeestantoj.

M.R. URUEÑA
Prezidantino de EJA
Fotoj: Luis Hernández



La Boca, tipa bonaera kvartalo



Titolo: *EŬROPA UNIO, PAŜON POST PAŜO*

Aŭtorino: D-ino María Rafaela URUEÑA ÁLVAREZ

Kuneldonita de Esperanta Jura Asocio kaj Andaluzia Esperanto.

ISBN: 978-84-930304-7-6

Serio: Juraj Kajeroj n-ro 2.

Prezo: 12 €

Petu jam vian ekzempleron ĉe: esperanto14@ono.com

PROBLEMOJ EN LA MARKOLO DE ĜIBRALTARO. LA ENHAVO DE LA TRAKTATO DE UTRECHT

✍ D-ino María Rafaela Uruña Álvarez
Hispanio

De tempo al tempo estas oftaj la novaĵoj pri problemoj okazintaj en maraj akvoj ĉirkaŭ aŭ apud la roko de Ĝibraltaro, kiuj kondukas al problemoj kaj miskomprenoj inter la hispanaj kaj ĝibraltaraj fiŝkaptistoj de ti areo.

La malkonsento pri la jura naturo de la akvoj kiuj ĉirkaŭas Ĝibraltaron kaj la difino de la hispanaj akvoj en la golfeto de Algeciras (pron. *Alheziras*) aldoniĝas al la jam tradiciaj pozicioj inter Britio kaj Hispanio pri la problemoj de Ĝibraltaro. Vere, jura studo de la problemoj en la Ĝibraltara markolo estas temo malfacile komprenebla.

Tiuj polemikoj ne estas novaj, kvankam nuntempe ili estas pli konataj tra la amasmedioj, sed ĉio komenciĝis post la Traktato de Utrecht (pro. *Utréht*) en 1713.

Historie, post la morto sen filoj de la hispana reĝo Karolo la 2-a en la jaro 1700, malfermiĝis debato pri la heredo de la hispana trono inter la ĉefduko de Aŭstrio, Karolo la 3-a kaj la burbona franca reĝa familio.

La angla-nederlanda armeo, apoganta la aŭstran pretendanton, prenis, post grandaj bataloj, la rokon de Ĝibraltaro

kaj apud la flavo de la aŭstra ĉefduko, oni hisis la britan flagon. La Traktato de Utrecht finigis la militon kaj la roko de Ĝibraltaro restis brita.

En Hispanio ekregis de tiam la franca Filipo la 5-a, unua burbona reĝo en tiu lando.

Tuj la problemoj komenciĝis pro la interpretado ĉefe de la 10-a artikolo de tiu Traktato. Ĝi tekstas, ke *la katolika reĝo cedas, per la traktato, al Britio la proprieton de la roko kaj kastelo de Ĝibraltaro, kune kun la haveno kaj fortikaĵo, sen teritoria jurisdikcio* (art. 10-a).

De tiam la interpretado estas malsimila inter Hispanio kaj Britio: dum Hispanio subtenas laŭvorte, ke la traktato ne cedas iun jurisdikcion pri la ĉirkaŭantaj maraj akvoj (ĝi cedas nur la internajn akvojn). Britio elstarigas, ke normale, tiu kiu havas la proprieton de la roko havu ankaŭ la suverenecon pri la ĉirkaŭantaj marakvoj pro preskriptiĝo. Pro tio Britio etendis sian jurisdikcian akvojn ĝis 3 maraj mejloj ĉirkaŭ la roko kaj ĝis 2 maraj mejloj en la golfeto de Algeciras, defendante, ke oni ne rajtas cedi maran teritorion sen rajto al la apudaj maraj areoj. Por Hispanio, tamen, tiu brita vidpunkto kontraŭas la Internacian Juron, ĉefe la Rezolucion 1514 (XV) de Unuiĝintaj Nacioj (UN) kiu tekstas jene: *ĉiu klopodo rompi entute aŭ parte la nacian unuecon kaj la teritorian integrecon de lando estas neakordigebla kun la celoj kaj principoj de la Ĉarto de Unuiĝintaj Nacioj*. Krome, Hispanio ĉiam interpretis laŭvorte la 10-an artikolon de la Traktato de Utrecht¹.

¹ J. DIEZ HOCHLEITNER, "Les relations hispano-britanniques au sujet de Gibraltar: état actuel" A.F.D.I. Vol. 35, 1989, paĝo 167.

Tiu frazo de la Traktato de Utrecht “*sen teritoria jurisdikcio*” reliefigas la bezonon apartigi klare la geografian areon kiun nuntempe konsistas la aktuala Ĝibraltaro, ĉefe la istmon sur kiu sidas la flughaveno kaj la terenojn gajnintajn al la maro sur kiu oni konstruis la novajn evoluojn de la urbo.

Por fini la tekston de la artikoloj de la Traktato, oni elstarigas, ke ili enhavas kelkajn rajtojn por Hispanio, kiel la persekutadon de la deliktoj je grava kontrabando kaj pri la “rajto de reaĉeto” nome, la preferan rajton de Hispanio repreni la teritorion se Britio eventuale decidus transdoni ĝin. Tiu lasta frazo malfermas nune diversajn interpretadojn ĉefe pensante, en la momento kiam Britio povus agnoski Ĝibraltaron kiel sendependan landon. Ĉu en tiu momento supozeble Hispanio defendus la rajton de reaĉeto? Tio estas nun doktrina opinio.

Do, nur la Traktato estas la jura kadro rilate Ĝibraltaron kaj la leĝa teksto por interpreti la jurajn problemojn ĉirkaŭ tiu areo. Tamen, kiel dirite, Hispanio defendas, ke ne estis cedita iu mara ĉirkaŭa marspaco (konvencia titolo), dum Britio konsideras, ke pro preskriptiĝo ĝi rajtas havi maran areon en la apuda istmo.

La jarcentoj pasis, la hispanaj reĝoj de la 18-a jarcento volis rehavi la suverenecon de la roko kaj sieĝis Ĝibraltaron, ĉefe en 1779 kaj 1783 kiam pereis pli ol 5000 hispanoj kaj preskaŭ 2000 britoj.

Sed flanklasante la malkoloniigajn problemojn kiuj ĉiam aperis, ĉefe per diversaj rezolucioj de UN, kaj kiuj estis ofte traktataj antaŭ la Malkoloniiga Komisiono de Unuiĝintaj Nacioj, la fakta situacio de la maraj akvoj de Algeciras kaj Ĝibraltaro

dependis de la malsimilaj pozicioj de la diversaj registaroj de ambaŭ ŝtatoj.

Iam la situacio estis plej streĉa, ĉar fakte estis jaroj kun la landlimo fermita, kiam la 8-a de junio 1969 la ŝtatestro Franko ordonis fermi la landlimon (la “kradon”, laŭ hispana esprimo) kie protesto pro la aprobo de Konstitucio en Ĝibraltaro, reafirmanta la ligan al la brita krono. Tiu situacio daŭris ĝis alveno de la demokratio en Hispanio kaj dum la socialisma registaro, la 14-an de decembro 1982 oni ordonis remalfermi la komunikadon eĉ por personoj. Jam en la t.n. Deklaracio de Lisbono, de la 10-a de aprilo 1980, inter la Ministroj pri Eksterlandaj Rilatoj de Britio kaj Hispanio, oni proponis pliajn konversaciojn por solvi la problemojn de Ĝibraltaro, plian kunlaboradon kaj ĉefe la restarigon de la komunikadoj. De tiuj proponoj nur la tria estis tuj plenumita.

La definitiva malfermo por personoj kaj varoj okazis la 5-an de februaro 1985, du monatojn post la subskribo de la Deklaracio de Bruselo per kiu Hispanio kaj Britio rekomencis la konversaciojn pri la suvereneco de Ĝibraltaro. Tio okazis en la kunteksto de la aliĝo de Hispanio al Eŭropa Komunumo kaj al NATO.

Tamen, foje la hispana registaro preferis havi mildajn rilatojn kun Britio kaj kun la ĝibraltaranoj kaj foje ili estis pli drastaj. Intertempe, Britio, iom post iom pligrandigis la teritorion de Ĝibraltaro. Kiam Hispanio cedis al Britio la havenon de Ĝibraltaro en la jaro 1713, oni fiksas neŭtralan zonon inter ambaŭflankoj. La grandeco de Ĝibraltaro estis 6,8 kvadrataj kilometroj, sed la urbo kaj la loĝantaro estis pli kaj pli granda, eĉ historie ja, profitante la intercivitanan hispanan militon ili plilongigis la ekfluejon 500 metrojn enirigante la ekflugejon en

parton de la maro kie tradicie ankris la britaj ŝipoj. La haveno de Ĝibraltaro havas eksterordinarajn naturajn kondiĉojn, alireblan al grandaj ŝipoj, kaj nuntempe estas loko kie albordiĝas grandaj truismaj kaj petrol-ŝipoj. Do, iom post iom, Ĝibraltaro okupis tiun neŭtralan zonon ne cedita laŭ la Traktato de Utrecht.

Krom tio, dum la 30-a jardeko de la pasinta jarcento, fakte en 1938, Britio konstruis flughavenon, kiu pligrandiĝis poste per novaj kaj pli longaj instalaĵoj¹.

Marjuraj konsideroj

Oni povas difini markolon kiel naturan marvojon inter du marbordoj kiuj apartigas du terajn zonojn kaj kunigas du marajn zonojn. La markolo Ĝibraltaro mezuras 33 marajn mejlojn² inter la sudokcidenta limo de la eŭropa kontinento, kaj en tiu zono konvergĝas la atlantika oceano kaj la mediteranea maro.

La 3-a Konferenco pri Marjuro de 1982 starigas plurajn jurajn sistemojn aplikeblaj al markoloj; ĝi fiksas liberan cirkuladon tra la markolo Ĝibraltaro kaj la tieaj akvoj restas submetitaj al la ŝtata suvereneco aŭ jurisdikcio, sen iu obstaklo por la navigado. Tiu Konferenco fiksas liberan pason tra la markolo, ĉar Ĝibraltaro ligas unuflanke parton de atlantikaj marakvoj, kie Maroko, Hispanio kaj Portugalio agnoskas Ekskluzivan Ekonomian Zonon (EEZ) kiuj intermiksiĝas, kaj

¹ Pri tiu flughaveno kaj ĉefe pri la interkonsento de Kordovo de la jaro 2006, vi povas legi la artikolon de José María Rodríguez en “Jura Tribuno Internacia” n-ro 8 de 2009 pri *Flughavenoj apud ŝtat-limoj*.

² Unu mara mejlo egalas al 1852 metroj.

aliflanke tie troviĝas parto de mediteraneaj akvoj kie nur Maroko ankaŭ agnoskas EE Zonon¹.

Revenante al nia historia studo, la redaktintoj de la Traktato de Utrecht volis malpermesi la jurisdikcion pri aliaj koneksaj temoj al la ĝibraltara teritorio, sed nuntempe ni ne povas nek pro kutinjuro, nek pro la praktiko kaj postaj internaciaj maraj traktatoj, ke tiu kiu havas teritorion ne havas la jurisdikcion pri la ĉirkaŭantaj akvoj, kaj tio ĉefe post la Konvencio de Unuiĝintaj Nacioj pri Marjuro de 1982. Tio evidentiĝis jam dum la interpretado hispan-brita pri la marspacoj en 1966, ligite al la malkoloniiga temo ene de Unuiĝintaj Nacioj, kaj, poste, okaze de la Konvencio pri Marjuro de 1982, post la 3-a Konferenco pri Marjuro.

Sed antaŭ ol daŭrigi, ni devas konsideri, ke la marjuro ne estis la sama dum la 18-a jarcento ol nuntempe, kaj ke ni devas studi tiun aferon laŭ la historia kunteksto, nome, laŭ la tempo kiam Hispanio kaj Britio subskribis la Traktaton, ĉar laŭ la latinoj “*tempus regit factum*” (la tempo regas la faktojn). Sur la traktatoj subskribintaj laŭlonge de la 18-a jarcento, oni ne trovas antaŭvidojn pri marrajtoj, ĉar komence de la 18-a jarcento tiu rajto estis ekevoluanta kaj ne estis klaraj limoj nek rajtoj pri la apudmaraj marareoj. Pro tio, ne estas stranga la ne-mencio pri teritoria maro de Ĝibraltaro sur la Traktato de Utrecht nek sur la antaŭaj duflankaj konversacioj inter Hispanio kaj Britio.

La principio pri marlibereco estis defendita, inter aliaj, de la nederlanda Hugo Grotius en sia verko “*De mare liberum*” (Pri libera maro) en la jaro 1609 kaj de la hispano Vázquez de Menchaca (pron. *Vaskes de Menĉaka*) en 1563 ene de

¹ V.L. GUTIERRÉZ CASTILLO, *La delimitación de las aguas marinas en el estrecho de Gibraltar*. Insituto de Estudios Estratégicos. Dok, 29/2011, aprilo.

“*Controversiarum illustrium*” kontraŭ la tezo defendita de la brita John Seiden en 1635 kiu per sia verko “*De mare clausum*” (Pri fermita maro) volis defendi la eblecon pri alproprigo de la maroj.

Vere, ekde la dua duono de la 17-a jarcento, Hispanio, Portugalio kaj aliaj maraj potencoj kiel Venecio, defendis la tezon laŭ kiu havas la proprieton de teritorio havas ankaŭ jurisdikcion kaj kontrolon sur la maraj apudaj areoj¹.

Tamen en 1702, nome 11 jarojn antaŭ la subskribo de la Traktato de Utrecht, la nederlanda Cornelius Van Bynkershoek, en sia verko “*De Dominio maris*”, (Pri la regado de la maroj), proponis novan kriterion por fiksi la teritorian maron kiu poste estis akceptita de la ŝtatoj kaj la praktiko ĝis la komenco de la 20-a jarcento. Bynkershoek proponis, ke la rajtoj de la ŝtatoj pri ĝia apuda maro atingos nur la efektivan kontrolon per la forto de la kanonpafo (*Potestatem terrae finire, ubi finitur armorum vis*), nome, la rajto de la tero finiĝas tie kien atingas la forto de la armiloj, en tiu momento la kanonoj.

Do, la cedo de Ĝibraltaro okazas en la momento de la naskiĝo de la marjuro, kiam ne estis ankoraŭ unuanimaj kriterioj pri la justa limsigno de la teritoria maro. Kontraŭe, tiam jam estis tute akceptita la principio pri marlibereco, ĉefe por navigado kaj fiŝkaptado.

Poste, ne estante konstanta hispana praktiko pri la historia defendo de manko de jurisdikcio pri la akvoj ĉirkaŭ Ĝibraltaro, Hispanio, kiam subskribis la Konvencion de Ĝenevo pri Teritoria

¹ SCOVAZZI, T. “*Elementi di diritto internazionale dil mare*”. Eld. Giuffrè. Milano 1994.

Maro kaj Apuda Zono en 1958, la hispana registaro deklaris, ke tiu subskribo ne povas esti interpretata kiel agnosko de iu ajn rajto aŭ situacio rilata al la marareo de Ĝibraltaro, ne aperantaj sur la 10-a artikolo de la Traktato de Utrech de la 13-a de julio 1713 inter Britio kaj Hispanio¹.

La saman deklaron ni trovas sur la hispana leĝo 10/1977 de la 4-a de januaro pri Teritoria Maro kaj okaze de la subskribo de la Konvencio de UN pri Marjuro de 1982. Ĉiam tekstas, ke ties subskribo ne povas esti interpretata kiel agnosko de rajtoj en la marareo de Ĝibraltaro, ne aperantaj sur la artikolo 10-a de la menciita Traktato de Utrech. Dum la subskribo de la menciita Konvencio pri Marjuro de 1982, Hispanio aldonis al tiu deklaro, la postulon konsideri tiun temon ene de la malkoloniiga proceduro de Unuiĝintaj Nacioj, laŭ la rezolucioj adoptitaj de la Ĝenerala Asembleo. Per tiuj deklaroj de Hispanio, oni volas, ke la ratifo de la Konvencio, kiu enhavas la bazan juran normaron por la marspacoj, de la 3-a Konferenco de UN pri Marjuro, ne povu signifi agnoskon de la brita jurisdikcio pri la apudaj maroj de la roko Ĝibraltaro, substrekante tion por ke neniu interpretu alimaniere tiun temon.

Tamen, laŭ mia opinio, kune kun tiuj de la plej granda parto de la doktrino, tiuj opinioj aŭ deklaroj nur havas relativan juran valoron, ĉar ili nur montras la tradician hispanan vidpunkton, ne estante veraj rezervoj al la Konvencio. Ili ne povas esti rezervoj ĉar la artikolo 309-a de la menciita Konvencio

¹ En la jaro 1930, sub aŭspicioj de la Ligo de Nacioj kunsidis en Hago la partoprenantoj en la Konferenco por kodigo de la internacia juro, sed ne estis ĝis la jaro 1958 kiam Unuiĝintaj Nacioj kodigis la marjuron, ene de la evoluo kaj kodigo de la internacia juro. En tiu ĉi konferenco de 1958 oni aprobis kvar traktatojn, la unua pri teritoria maro kaj apuda zono, la dua pri alta maro, la tria pri protektado de biologiaj marestaĵoj kaj la kvara pri kontinenta breto.

pri Marjuro fiksas, ke ne eblas rezervoj ekscepte tiuj eksprese permesitaj en aliaj artikoloj de la Konvencio.

Tamen, la artikolo 310-a permesas al la ŝtatoj, dum la subskribo aŭ ratifo de la teksto, fari deklarojn kiuj ne kontraŭas la jurajn efektojn de la Konvencio. Pro tio, unuflanka deklaro nur havas relativan valoron, ĉefe pro la fakto, ke la nuna marjuro agnoskas la kutimjuran tekston “*la tero regas la maron*” kaj sekve de tio la suvereneco de ŝtato etendiĝas sur ĝia teritorio, internaj akvoj kaj apuda maro, nomita teritoria maro (art. 2).

Brita vidpunkto

Historie la nura referenco al Ĝibraltaro aperas sur la *Territorial Waters Jurisdictional Act* de Britio de la jaro 1878, kiu fiksas teritorian maron je 3 maraj mejloj suden kaj orienten kaj la jurisdikcion pri 1,5 mejloj okcidenten.

La doktrino pri “seka marbordo”¹ defendita de Hispanio estis protestata de britaj diplomataj institucioj kaj kritikata same de la hispana kaj eksterlanda doktrino². Pro tio, la problemo pri la akvoj de Ĝibraltaro favoras la vidpunkton de Britio.

¹ VERDÚ BAEZA, J “La controversia sobre las aguas de Gibraltar: el mito de la costa seca”. *Revista Española de Derecho Internacional*, vol 66-1, 2014 paĝoj 81-214.

² SOBRINO HEREDIA, J.M. “Mares y océanos en un mundo en cambio”. *Tendencias jurídicas, actores y factores*. 21 Jornadas de Profesores de Derecho Internacional y Relaciones Internacionales. A Coruña 22-24 septiembro 2005. Eld. Tirant lo Blanch. Valencia 2007.

ROLDAN BARBERO, J. “*Las relaciones exteriores de España*”. Eld. Universidad de Almería-Dykinson 2001.

Ekde la 18-a jarcento, la britaj registaroj kontrolis efektive la apudmarajn akvojn de la Roko, kvankam en la komenco ĝia milita, komerca kaj havena graveco ne estis granda. La problemoj pri la kontrolo de tiuj akvoj estis esence militaj kaj rilataj al kontrabando, ankaŭ laŭlonge de la 19-a jarcento. Dum la 20-a jarcento la rilatoj hispa-britaj estis sufiĉe pacaj dum la unua duono, ĝis la 6-a jardeko, kiam la tiama registaro postulis la teorion pri “seka marbordo”.

Kiel reago al tiu pozicio, la 10-a de oktobro 1966, sur la kadro de la hispan-britaj intertraktatoj sub la aŭspicioj de Unuiĝintaj Nacioj pri la eventuala malkoloniigo de tiu teritorio, Britio kontraŭis la hispanan vidpunkton per la defendo de la art. 10-a de la Traktato de Utrecht. Britio defendis unu plian fojon, la aŭtomatan suverenecon sur la apudaj jurisdikciaj akvoj, same ĝi sciigis, ke la brita registaro ĉiam estas preta intertrakti kun Hispanio la dividon de teritoriaj akvoj en tiu zono. Tamen, pro la fakto, ke ne estas ankoraŭ interkonsento, la brita registaro fundamentas sian rajton sur la apudmaraj akvoj de Ĝibraltaro “*laŭ la ĝeneralaj jurprincipoj de internacia juro*”.

Aliflanke, same ol Hispanio, Britio profitis la ratifon de la Konvencio de UN pri Marjuro de 1982 por aktualigi sian vidpunkton. Ĝi defendis la laŭleĝecon de la limsigno de la akvoj de Ĝibraltaro ĝis mejlo kaj duono okcidenten, ene de la golfeto de Algeciras, (egaldistanca linio proksimume), kaj 3 mejloj je la sudo kaj oriento.

Sur la oficiala ĵurnalo de 1987 *The Gibraltar Gazette* aperis detale mapo pri la tiel nomitaj “*the British Gibraltar territorial Waters*”. Sur ĝi oni limsignas la akvojn kiujn oni trovas denove sur oficialaj naŭtikaj ĉartoj de la Brita Admiralto. Tiu mapo ne estas nova, ĉar ĝia origino troviĝas sur mapo de

1875, kie oni fiksas la regulon pri 3 maraj mejloj kaj la principon pri egaldistancon tie kie alimaniere ne eblas.

Ĉiuj ĝibraltaraj akvoj troviĝas nun inkluzivitaj kiel natura protektata areo, per la *Nature Protection Act* de la jaro 1991, kiu starigas kelkajn limojn al navigado kaj fiŝkaptado. Nune, la limsignado de tiuj akvoj estis fine fiksita la 10-an de februaro 2011 per korekto de la *Nature Protection Act*, kiel marareo ĝis tri mejloj suden kaj orienten kaj laŭ egaldistanca linio sur la markolo Ĝibraltaro, laŭ la normoj de la Konvencio pri Marjuro de 1982.

Krome, la permesema sinteno de la hispanaj registaroj kaj la fakto ke Hispanio per la Dekreto 2510/77 de la 5-a de aŭgusto, (pri limsignado de la hispanaj jurisdikciaj marakvoj) ne fermis la golfeton de Algeciras per rektaj linioj, estis profitata de Britio por defendi la implicitan agnoskon flanke de Hispanio de la brita reklamacio pri la marakvoj kiuj ĉirkaŭas la rokon Ĝibraltaron.

Hispanio havas 12 marajn mejlojn kiel teritorian maron ekde la bazlinio, en ĉiu sia marbordo, kaj kiam du ŝtatoj situas geografie unu kontraŭ la alia, kutime oni uzas egaldistancon linion. Sed, pro la fakto ke Hispanio ne volas agnoski la britan jurisdikcion ne estis interkonsento rilate la limsignadon de la marakvoj en la golfeto de Algeciras.

Nuntempa situacio

Kiel dirite, la hispana vidpunkto estas, ke la limoj de la marareo en ĉi tiu zono estas la egaldistanca linio inter la hispana, maroka kaj brita marbordoj. Nun estas 120 markoloj en la mondo, inter kiuj, laŭ la larĝeco de la teritoria maro, cent troviĝas submetitaj al teritoriaj akvoj de la marbordaj ŝtatoj, kaj Ĝibraltaro

estas unu el tiuj kiu havas pli grandan internacian martrafikon, proksimume 250 ŝipoj ĉiutage. Kiel dirite, laŭ la lasta Konvencio pri Marjuro en la ĝibraltara markolo regas la “libereco pri navigado kaj superflugo”, sed nur por rapida kaj daŭra trafico. Rilate tion ĉi, la ŝipo plenumos reglamentojn, procedurojn kaj praktikon ĝenerale akceptitajn por la sekureco en la maro kaj por eviti ŝipsturmojn kaj por kontroli la marpoluadon.

La ne-limigo de la jurisdikciaj akvoj en Ĝibraltaro favoras diversajn problemojn, ĉar Hispanio neniam oficiale agnoskis la plilongiĝon de la brita teritorio en Ĝibraltaro. Jam historie, en 1851 hispana propono por limsigni tiujn akvojn en Ĝibraltaro ne sukcesis.

La konstantaj problemoj pri fiŝkaptado en tiuj akvoj post la brit-hispana interkonsento de 1998 devigis la tieajn fiŝkaptistojn subskribi alian privatan interkonsenton kun la Ĉefministro de Ĝibraltaro S-ro Caruana (pron. *Karuana*). Tio kontraŭas la sintenon de la hispanaj aŭtoritatoj kiuj nur konsideras Brition taŭgan interparolanton, ĉar vere nur Britio kaj Hispanio estas subjektoj de internacia juro, ĉar Ĝibraltaro estas nur kolonio de Britio.

La “krado”, loko por limkontrolo en hispana teritorio ne estas jura landlimo, sed lima pasejo kie nur Hispanio kontrolas personojn kaj varojn. La apudmaraj akvoj de la istmo estas klare akvoj sub hispana suvereneco, sed tiuj akvoj estas sidejo de multnombraj incidentoj kiuj eĉ iam bezonis la helpon de britaj militŝipoj por malpermesi fiŝkapti hispanajn ŝipojn, dum alifojte estis la hispanaj militŝipoj kiuj apogis la hispanan fiŝkaptadon en tiuj akvoj.

La faktoj estas tre ŝanĝiĝemaj kaj ofte oni malpermesas fiŝkapti al la fiŝkaptistoj el Algeciras ĝis unu mejlo. Krom tio, en 2010 la ĝibraltara registaro komencis submarajn prospektoradojn ene de akvoj kiuj estas hispanaj, sed konstantante, ke neniu aŭtoritato malpermesis tiujn aktivaĵojn, la brita admiralto decidis krei novan naŭtikan karton fiksan tiun marareon kiel propran. Malgraŭ kelkaj izolitaj kvereloj, la hispanaj aŭtoritatoj, policaj, doganaj aŭ havenaj, ne kontrolas efektive la ĉirkaŭantajn marajn akvojn de la roko, kontraŭe al la oftaj deklarioj de la hispanaj registaroj. Certe iam Britio kaj Hispanio, plurfoje situos buojn kun limsigna funkcio de tiu areo, sed vere Hispanio ne havas iun kontrolon pri la ŝipoj, ne nur komercaj, sed ankaŭ pri grandaj krozadŝipoj kaj eĉ malgrandaj fiŝkaptistaj boatoj.

Do, mankas kunordigado por la kontrolo kaj ŝirmado de tiuj maraj areoj. Tio kaŭzas gravajn problemojn: mankas kunordigado de la maraktivaĵoj en la golfeto kaj la tieaj ŝipoj, ne ekzistas kunlaboro pri la mara trafiko, kaj tio estas tre grava, ĉar jam okazis pluraj gravaj akcidentoj, kaj fine, malkunordigado de la naturaj protektitaj spacoj, kio atencas kontraŭ la medio. Ni devas scii, ke la golfeto de Algeciras havas gravan martrafikon kaj tiu de Algeciras estas la haveno kun pli nombra martrafiko en Hispanio.

Do, Ĝibraltaro ricevas grandan kvanton da ŝipoj, ĉu turismaj, ĉu tiuj kiuj iras por provizi sin per karburado, kaj tio kaŭzas marpoluadon. Pro tio, pro la grava risko por la tuta golfeto de Algeciras kaj akvoj ĉirkaŭ Ĝibraltaro, oni bezonis la kunordigadon inter la havenaj hispanaj aŭtoritatoj, tiuj britaj kaj eĉ ĝibraltaraj, por eviti kaj kontroli la gravajn marajn fluojn, la maran poluadon kaj la taŭgan aplikadon de la eŭropa kaj internacia regularoj.

Por tiu celo, oni starigis dialog-forumon, laŭ tri flankoj, tio estas: inter Hispanio, Britio kaj Ĝibraltaro en kies kadro oni atingis, en septembro de 2006, la t.n. “Interkonsentoj de Kordovo”, kaj tiuj daŭris traktante mediajn temojn ene de la problemoj pri Ĝibraltaro. La dua kunsido, je ministra nivelo, en junio 2008, plifortigis la temojn pri mara sekureco, ĉar fakte okazis pluraj gravaj maraj akcidentoj ĉe la akvoj proksimaj la Ĝibraltaro, ĉefe okaze de la kolizio de la ŝipo *New Flame* kaj ties posta alfundiĝo, kaj la grundado de la ŝipo *Fedra*, kvankam ĝis nun oni ne konstatas gravajn antaŭenirojn.

Alia problemoj kiu ankaŭ maltrankviligas la ekologiistojn estas la t.n. *bunkering*, flosantaj benzinejoj, kiuj provizas per benzino grandajn ŝipojn en la maro ĉirkaŭ la Roko. Tiuj grandaj benzinejoj multe polucias pro la daŭraj transfluigoj de karburajoj de ŝipo al ŝipo.

La necesa protektado de la medio, malfermis al ambaŭ partioj bonegan okazon por kunlaboro. Sed baldaŭ denove problemoj aperis subite.

La elirpunkto estis la ĝibraltara iniciato de 2004, per kiu Britio proponis al Komisiono de la Eŭropa Unio, akcepti la ĝibraltarajn akvojn kiel “lokon je komunuma intereso”, por protekti kaj disvolvi la Direktivo “*Habitats*”¹. Surprize, la Komisiono, per Decido de la 19-a de julio 2006 inkludis en ĝiaj listoj la tiel nomatan “*Southern Waters of Gibraltar*”, sub brita respondeco.

La respondo estis tuja: Hispanio petis inkludi novan protektitan spacon kiu enhavas la tuton de la ĝibraltaraj akvoj,

¹ Direktivo *Habitats* 92/43 EEK.

nome britajn kaj hispanajn akvojn. Tiuj propono ankaŭ estis akceptita per Decido de la Komisiono de la 12-a de decembro 2008, nomumante la novan protektitan areon “Orientan Markolon”.

Sekve, Hispanio malpermesis la flosantajn benzinejojn kiuj estas kapabla stoki ĝis 100.000 tunojn da mara karburajo por ŝipoj en tiu areo deklarita je speciala protektado far Eŭropa Unio.

La duobla teoria protektado pri la samaj akvoj ĉirkaŭ Ĝibraltaro ne faciligas, paradokse, efikajn protektadajn meĥanismojn por la maraj akvoj, sed kontraŭe novan kadron por politika kaj jura kverelo. Tiel la ĝibraltara registaro en majo 2009, kaj la brita registaro en marto 2010 turnis sin antaŭ la Eŭropunia Kortumo kontraŭ la Decido de la Komisiono kiu akceptis la hispanan proponon. La ĉefa argumento estas, ke la eŭropunia Decido inkludas akvojn kiuj ne estas sub hispana suvereneco, sed sub brita jurisdikcio.

La ĝibraltara proceduro antaŭ la Eŭropunia Kortumo estis malakceptita en 2011 kaj denove en 2012, post apelacio, sur la bazo, ke ne estas akceptebla peti partan nuligon. Same okazis rilate al la brita apelacio de marto 2010 kontraŭ la Decido de la Komisiono 2011/85 EU de la 10-a de januaro 2011; Britio ankaŭ apelaciis kasacie kaj ĝia peto estis neakceptita per Verdikto de la 29-a de novembro 2012.

Resume, la ĝibraltara problemo pri la apudaj maraj akvoj kiu ekestis duflanka (brita kaj hispana) kaj triflanka poste, kun la ĝibraltara registaro, eniris en juran kadron pri aplikado de la Eŭropunia Juro.

Flankigante la politikajn britan kaj hispanan poziciojn, la granda viktimo de tiu situacio estas la marmedio de tiu areo, kaj la vivkvalito kaj vivkondiĉoj de la loĝantaro de Algeciras kaj la Ĝibraltara roko.

Krome, dum la monato aŭgusto 2013 novaj problemoj aperis, ĉar la registaro de Ĝibraltaro ordonis ĵeti en la maron grandajn blokojn el betono en la golfeto de Algeciras por malpermesi la fiŝkaptadon al hispanaj fiŝkaptistoj. En tiu momento, la nuna hispana konservativa registaro, malpli tolerema ol la antaŭa socialisma registaro, malmoligis la kontrolojn ĉe la “krado” rilate verturilojn kaj personojn, ĉefe por limigi la kontrabandon, konsiderante, ke Ĝibraltaro ne apartenas al Schengen-areo¹. Britio protestis antaŭ Eŭropa Unio, sed la Eŭropa Komisiono respondis, en novembro 2013, konstatante, ke Hispanio ne kontraŭis la normojn de Eŭropa Unio, okaze de tiu lasta konflikto ĉe la Roko. Tiu favora opinio de Bruselo enhavas kelkajn rekomendojn kaj por Britio kaj por Hispanio, kaj oni sendis spertulojn al Ĝibraltaro. La Komisiono agnoskas, ke tiu lima “krado” havas grandan trafikon en loko relative malgranda, kaj la pliigo je la eniro de tabak-kontrabando en Hispanion pravigas la hispanan agadon. Tamen, la Eŭropa Komisiono rekomendas daŭrigi la interparoladon inter ambaŭ landoj.


Do, tri jarcentojn post valida traktato, neniam reviziita, ankoraŭ restas malfermitaj multaj gravaj temoj kiuj devos esti traktataj, inter aliaj, la limigo de la marakvoj laŭ la nuna juro de la maro, kunlaboro sur multaj aspektoj kiel la sekureco je

¹ La Traktato de Schengen estas interkonsento kiu forigas la ŝtatliman kontrolon de personoj kiuj traveturas trans ŝtatlimoj inter la aliĝintaj ŝtatoj. La Traktato estis subskribita la 14-an de julio 1985 en la urbo Schengen (Luksemburgio).

navigado, fiŝkaptado, protektado de la medio ktp. esencaj por normaligi la hispan-britajn rilatojn pri Ĝibraltaro.



La blanka cirklo montras la urbon Ĝibraltaron kaj la golfeton Algeciras el sputnika vidaĵo.



Obelisko en la Placo de la Respubliko en Bonaero, starigita okaze de la 4-a jarcento de la fondiĝo de la urbo sur la loko kie unuafoje flirtis la argentina standardo.

LA AZIL-RAJTO KAJ LA INTERNACIA PROTEKTADO DE LA RELIGIA LIBERECO

 José María Rodríguez Hernández
Hispanio

La vorto *azilo*¹ aperas en la antikva greka civilizacio, ĝi difinas tion kion oni ne povas kapti, sed el historia vidpunkto la vorto pritraktas du interrilatajn aferojn, unuflanke la vorto *azilo* parolas pri la protektado oferita al persekutata homo kaj, aliflanke, oni parolas pri la loko kie la persekutito sentas sin savita. Ĉi tio memorigas al ni, ke la vorto mencias ne-tuŝeblan lokon². Do, historia elemento de ĉi tiu jura instituto, la azil-rajto, intime rilatiĝas al religio, ĉar unuamomente tiuj lokoj kie oni garantiis la sekurecon, do la vivon, al persekutitoj estis la preĝejoj, tio estis sakraj zonoj. Aperis tiam la religia elemento de la jura institucio pri la azilo, ĉar la temploj estis la plej gravaj kaj efikaj lokoj por certigi la azilon³.

¹ El la greka ἄσυλον, ne-tuŝebla loko.

² La profesoro LOPEZ GARRIDO, D. en *El Derecho de Asilo*, eld. Trotta, 1991, opinias, ke *verŝajne la Katolika Eklezio, dum la periodo kiam okazis konfliktoj inter la Imperio kaj la Papeco, valorigis la institucion pri la azilo. Dum la feŭda epoko la preĝejoj, kiel sanktaj lokoj, oferis protekton al tiuj kiuj fuĝis el la civila povo, do tiuj kiuj estis protektitaj ĉe tiuj lokoj estis ne-tuŝeblaj.*

³ GARCIA MACHO, R. *El Derecho de Asilo y del Refugiado en la Constitución Española. Estudios sobre la Constitución Española*. Tomo II, Madrido 1992. Laŭ ĉi tiu profesoro la azil-rajto iamaniere korektis la homan justicon, ĉar oni vokis Dion kiel garantianton de la Juro kontraŭ la ekspluatado de la homoj kaj ties justico.

La apero de la naciaj ŝtatoj favorigis la naskiĝon de la civila suvereneca povo, do, oni forgesis la religiajn elementojn de multaj juraj institucioj, ankaŭ tiuj pri la azilo. Ekde tiam, la azilo estis la protektado libere garantiita de ŝtato favore al homoj persekutitaj en iliaj propraj landoj. Naskiĝis tiam, dum la 18-a jarcento, la rifuĝinto¹.

Oni konsideras rifuĝinton al eksterlandano serĉanta protektadon ĉe ŝtato, pro la fakto, ke li partoprenas en la samaj juraj civilaj aŭ religiaj valoroj de la ŝtato kie li serĉas tiun sekurecon, male tiuj valoroj ne estas respektataj en lia propra lando. Malaperas tiam, la kialo pure kaj esence religia por serĉi azilon, ĉar reale temas pri personoj kiuj ne havas problemojn rilate la adaptiĝon al la nova ŝtato.

Tiutempe la ŝtato estis tute libera akcepti aŭ ne tiujn rifuĝintojn. Do, ne temis pri persona rajto esti protektata, sed suverena rajto de la ŝtato garantii la protektadon al homoj partoprenantaj en la naciaj valoroj. Sekve, la jura institucio pri la azilo, dum la lastaj du jarcentoj, estas donita rajto al eksterlandano.

La azil-raĵto kaj la statuso de la rifuĝintoj

Azilo kaj rifuĝo estas du juraj institucioj tute ligitaj, tamen ekzistas malsimilaĵoj inter ambaŭ aferoj. Tiel, rilate la azilon ne ekzistas internacia jura kunveno, male la rifuĝinto ĝuas propran normaron. Ni povas difini la azil-raĵton kiel “la protektado oferita de ŝtato al homo kies civitaneco ne apartenas al tiu ŝtato

¹ La artikolo 120 de la Konstitucio Montagnarde de la 24-a de junio 1793 proklamas, ke *la franca respubliko garantias azilon al la eksterlandanoj forpelitaj de iliaj propraj patrujoj pro ilia serĉado de la libereco, kaj samtempe rifuzas la tiranojn.*

kaj kies vivo aŭ libereco endanĝeriĝas pro aktoj, minacoj aŭ persekutado de la aŭtoritatoj de ŝtato, de grupoj aŭ hom-amasoj kiuj ne estas kontrolataj de la ŝtato”¹. Ĉi tiu protektado signifas la akcepton de la ŝtato oferanta sekurecon al azil-petanto kiu estas persekutata en sia propra ŝtato pro politikaj, ideologiaj aŭ eĉ religiaj kaŭzoj. La ŝtato rajtas akcepti lin aŭ ne, tio kion oni ne rajtas fari, estas resendi la azil-petanton en la ŝtaton kie li suferis la persekutadon

Jura Reĝimo de la Azil-raĵto

La plejmulto el la ŝtatoj en la internacia komunumo pritraktas la aferon pri la azilo en sia leĝaro kiel ŝtatoj akceptantaj rifuĝantojn, pro la fakto, ke la temo akcepti ilin kune kun la kondiĉojn de tiuj homoj estas ekskluziva rajto de la ŝtatoj. Tamen, malgraŭ tiu nacia ekskluziva rajto, ankaŭ estas eble trovi internaciajn traktatojn pri ĉi tiu temo, inter ili tiuj ĉe la Eŭropa Unio. Kiel dirite, la rifuĝo, ne la azilo, estas jura institucio internacie agnoskata, do la ŝtatoj, surbaze de ĉi tiuj internaciaj kunvenoj, atingis kompromisojn ankaŭ rilate la azilon, kvankam ĉi lasta estas institucio apartenanta ekskluzive al la ŝtato.

La unuan traktaton oni subskribis en la jaro 1933², kiam oni decidis, ke la ŝtato ne rajtas resendi la azil-petantojn al la ŝtato el kie li venis, temas pri la devo *non-refoulement*, ĉar tie la vivo aŭ la libereco endanĝeriĝas. Poste, oni aprobis internacian

¹ Ĉi tiun difino proponas DIEZ DE VELASCO, M. *Instituciones de Derecho Internacional Público*. Eld. Tecnos, Madrido, 1994.

² Temis pri la Konvencio pri la Internacia Statuso de la Rifuĝintoj, subskribita en Ĝenevo la 28-an de oktobro 1933, fare de Belgio, Bulgario, Danio, Egiptio, Francio, Italio, Norvegio kaj Ĉekoslovakio.

akordon por pritakti la aferon de la rifuĝintoj germandevenaj¹, tamen videblas, ke temas pri akordoj rilataj al tre konkretaj grupoj kaj ili ne emis solvi la ĝeneralajn problemojn de la rifuĝintoj kaj/aŭ azil-petantoj.

Post la dua mond-milito la afero pri la rifuĝintoj akriĝis, tiutempe 1946, la ĵus kreita Unuiĝintaj Nacioj fondis la Internacian Organizon por la Rifuĝintoj, kiu poste fariĝus la Alta Komisararo de Unuiĝintaj Nacioj por Rifuĝintoj². En la jaro 1951 la ŝtatoj kunvokis la Internacian Konferencon cele la aprobon de la statuson de la rifuĝintoj, kiu ekvalidiĝis post 1954. Ĉi tiu dokumento agnoskas la kondiĉon kiel rifuĝinton nur al tiuj kiuj serĉas protektadon post tiu jaro, krome la ŝtatoj rajtas agnoski tian kondiĉon ne al ĉiuj homoj sed male al tiuj kiuj venas de konkretaj zonoj. Tamen, ĉi lasta konvencio nenion diras pri la azil-petantoj, malgraŭ la rajto proklamita en la jaro 1948, kies artikolo 14-a asertas, ke ĉiuj rajtas serĉi kaj ĝui azilon ĉe aliaj ŝtatoj se oni suferas persekutadon.

La religiaj kredoj, afero pri internacia protektado

La religiaj kredoj estas grava elemento cele la koncedon/atingon de la azilo kaj la agnoskon de la rifuĝ-statuso. Tamen, la unua problemo aperas kiam oni deziras difini kio estas religio aŭ religiaj kredoj. Verdire, la preparaj laboroj por la subskribita konvencio de la jaro 1951 agnoskis, ke la religiaj motivoj estas gravegaj por atingi la statuson de rifuĝanto, tamen ene de la konvencio eĉ ne difinas kio estas religio.

¹ Provizora Akordo rialta al la kondiĉo de la rifuĝantoj devenantaj el Germanio, de la jaro 1936.

² Fondita en la jaro 1950 AKUNR havas kiel ĉefajn taskojn doni al rifuĝintoj - sendepende de ilia raso, religio aŭ politika opinio - internacian juran protekton kaj serĉi daŭrajn solvojn por iliaj problemoj.

Estis AKUNR, pere de siaj direktivoj, kiuj ellaboris la koncepton pri la protektado de homoj pro religiaj aferoj, karakterizitaj de la libereco je pensado, je konscio kaj religio, same, oni parolas pri la rajto ne-sekvi devige konkretan religion.

Do, la azil-petoj bazitaj sur religiaj kaŭzoj devas konsideri la religiajn kredojn laŭ unu aŭ kelkaj el la jenaj elementoj:

- 1) Religio kiel kredo.
- 2) Religio kiel identeco.
- 3) Religio kiel vivo-formo.

Laŭ tiu listo, la religio estas intime ligita al la kreemo aŭ ne-kreemo en dia ento, kreemo kiu estas ĉefa karaktero de la azil-petanto kaj esenca por sia vivo-formo. Tio estas, la religio estas esenca afero en la maniero rilatiĝi kun aliaj homoj. Akorde al tio ĉe la Universala Deklaracio de la Homaj Rajtoj, la rajto je religia libereco temas pri *la rajto diskonigi la religion aŭ kredojn de la homoj, ĉu individue, ĉu grupe, pere de ritoj, praktikoj, instruado publika aŭ privata*¹ kaj tre simile, la Internacia Pakto pri Civilaj kaj Politikaj Rajtoj asertas, ke *neniu povas suferi koakton kiu malpliigus sian rajton adopti libere religion aŭ kredon*². Kaj en tiuj ŝtatoj kie ezistas minoritatoj, ili povas ĝui propran kulturen vivon, sekvi kaj praktiki sian propran religion kaj uzi sian lingvon³.

¹ Laŭ la artikolo 18-a de la Universala Deklaracio pri Homaj Rajtoj.

² Tion esprimas la artikolo 18.2 de la Internacia Pakto pri Civilaj kaj Politikaj Rajtoj aprobita de la Ĝenerala Asembleo de Unuiĝintaj Nacioj en la jaro 1966, ekvalidis la 23-an de marto 1976.

³ Laŭ la artikolo 27 de la Internacia Pakto pri Civilaj kaj Politikaj Rajtoj.

Do, la persekutado pro religiaj aferoj povas esti tute radikala, kiam oni malpermesas komplete la praktikon aŭ instruadon de konkreta religio aŭ pli simpla, kiam oni suferigas diskriminacion pro la aparteno al religio. El la eŭrop-unia vidpunkto la azil-rajta politiko estas komuna afero kiu interesiĝas al ĉiuj ŝtatoj membroj. Do, oni aprobis aplikeblajn komunajn normojn cele la reguladon de ĉi tiu afero. Tiel, la Direktivo 2004/83 de la 29-a de aprilo pritraktas la religian aferon se oni prezentas azil-peton. Ĝi konsideras la religion kiel kaŭzon por peti kaj havigi azilon.

Rilate la praktikan aplikadon de ĉi tiu protektado, ĝenerale la tribunaloj petas la nepran ekziston de kelkaj elementoj ene de la azil-peto:

- 1) La kaŭzo de la persekutado nepre devas baziĝi sur religiaj kialoj.
- 2) La danĝero devas esti sufiĉe grava kaj ĝi devas esti konsiderata kiel atako al la homaj rajtoj.
- 3) Se ekzistas atako kontraŭ la religia praktikado rilate konkretan kredon, tio devas ekzisti rilate la publikan kaj la privatan praktikon de tiu religio.

Jurisprudenciaj kazoj¹ pri la azil-rajto bazita sur religiaj kredoj.

- Juĝo de la 27-a de aprilo 2002 (Hispana Supera Tribunalo): oni koncedis azilon al civitano de ŝtato X, membro de religia minoritato, kiu suferis persekutadon ne de la aŭtoritatuloj mem sed de grupo pli malpli tolerata de la ŝtato.

¹ La ellaborado de ĉi tiu ĉapitro baziĝas nur sur hispana jurisprudencio.

- Juĝo de la 23-a de junio 2006 (Hispana Supera Tribunalo): familio kiu suferis persekutadon pri siaj religiaj kredoj, kaj en la lernejo rilate la filojn kaj en la labor-lokoj de la maturuloj. Kvankam unuamomente la diskriminacio povus havi ekonomiajn bazojn, pro la fakto, ke neniu el la familianoj sukcesis trovi labor-lokon, tio suliĝis al ilia aparteno al konkreta religio. La ŝtato kie ili estis civitanoj neniam agis kontraŭ tiu diskriminacio.


- Juĝo de la 22-a de decembro 2003 (Hispana Supera Tribunalo): kuracistino, civitanino de la ŝtato X, estis devigita praktiki abortigojn en la hospitalo kie ŝi laboris, malgraŭ ŝia religia kredo kiu malpermesis tiun agadon. La ŝtato ne agnoskis ŝian rajton pri konscienc-objektado rilate abortigojn.

- Juĝo de la 9-a de septembro 2005 (Hispana Supera Tribunalo): civitano de la ŝtato X, devigita sekvi la religiajn kredojn de sia familio. Lia patro eĉ estis la religia respondeculo de sia komunumo, kiam la patro mortis li, devige, devus esti la nova religia gvidanto, tamen li rifuzis tiun religian kredon. Li suferis mort-minacojn.

Finaj Konsideroj

La religiaj kredoj, kune kun la politikaj opinioj aŭ la aparteno al persekutataj minoritatoj, estas la ĉefaj motivoj por la peto/koncedo de azil-rajto. Tamen, la havigo de tiu azilo estas ekskluziva rajto de la ŝtato kie oni ricevas tiun peton. Ofte aperas ĉe la medioj atakoj al homoj pro ilia religiajn pensoj kaj foje, eĉ aperas televide bruligo de preĝejoj kun bedaŭrinde dekoj da viktimoj. La azil-rajto bazita sur religiaj aferoj estas pruvo pri la internacia projekcio de la respekto al la libereco, pro la fakto, ke

ne temas pri respektado al la libero je konscio kaj penso en konkreta lando, sed ankaŭ la disvastigo de tiu respekto en la internacian komunumon.



Supera Kortumo de la Respubliko Argentino en Bonaero

Utilaj Notoj dum la Kuveno de EJA
Bonaero julio 2014

*Ĉi tiu numero estas speciale dediĉita al
la esperantistaro de la urbo Córdoba en
Argentino, kiel sincera omaĝo de la
lontana samideanaro de la urbo
Córdoba en Hispanio.*



Eldonita en la urbo CÓRDOBA (Andaluzio – Hispanio) julio 2014.

Prezentita en BUENOS AIRES (Argentino), okaze de la 99-a
Universala Kongreso de Esperanto, 26-a julio / 2-a aŭgusto 2014.